




PENSEO

N-ro 122

DEC./2001

**Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.anteo.domainvalet.com



Ĝojan

Zamenhofan

Feston!

Poemo de Mao Zedong

Laŭ melodio Heŝjinlang

1923

Adiaŭ al vi mi mansvingis jam.
Kiel elteni mornan intervidon povus mi,
amaran rakontadon vian!
Jen enokule kaj surbrove kun melankoli',
gutontan varman larmon vi retene maskis.
Leteroj lastaj niaj miskomprenon eble naskis.
Ĝi kiel nebul' tuj malaperos en pelmel',
ĉar en ĉi mond' sendube nur vi kaj mi plej intimas.
Ĉu scias la ĉiel',
ja kio min deprimas?

Pavimis prujno ĉimatene l' orientan vojon,
malalte l' lunark' lumigis la lageton jen,
ĵetante suben nur malĝojon.
Ŝirante mian koron, la fajfado de l' siren'
nin apartigis unu de alia ekde nun.
Fadenojn mincajn ni fortranĉu de ĉagrena font',
kvazaŭ krevigus siajn klifojn Kunlun Mont',
kvazaŭ balaus blove l' teron tutan la fajfun'.
Ni soru kune birde
kun nuboj, flirte.

elĉinigis **Vejdo**

VORTOJ EN LA KORO

Lu Jianbo

Karmemora Profesoro Lu Jianbo forpasis dek jarojn. Por memori lian forpason, ni tradukigis pecon "Vortoj en la Koro" el lia literature verko kun la sama titolo publikigita en la kvardekaj jaroj de la lasta jarcento.

Redakcio

La somera ferio jam finiĝis. Ne, por mi, estas dece diri, ke la someraj tagoj jam forpasis, ĉar mi jam ne havis ferion pli ol unu aŭ du jarojn, ĉu mi laboras cerbe aŭ fizike. Ofte okazis, ke mia spirito estas ekscitita de mia volo, kaj kune kun mia volo, rezistas kontraŭ mia laceco de mia korpo. Tio ne devas rezulti, ke mi ne simpatias kun kaj domaĝas mian korpon. La kaŭzoj estas: unue tion decidis mia kamelo-simila temperamento kaj mi ne alkitimiĝas al neokupiteco; due mi volas forigi mian solecon. Mi vivas en okcident-stila antikva templo kune kun kelkaj laboristoj, kiuj ĉiuj malmultan tempon ĉeestas. Kvankam ni havis plurajn vivecajn tagojn, kiuj ŝajnis al mi orel-pike bruaj, mi tamen sentis enuon pro tio.

Mia vivo vere estis malpli bona ol tiu de heliko kaj tuttage min rodas la sento vivanta en la ŝelo. Kaj eĉ mi ne volis elŝovi miajn antenojn por esplori supren kaj malsupren, dekstren kaj maldekstren. Do mi turnis min al antikvaj verkistoj kaj dronis en la am-rakontoj inter banalaj aŭ eksterordinaraj viroj kaj virinoj kun malsamaj sortoj. Tiamaniere, en miaj okuloj, la spaco larĝiĝis kaj tempo etendiĝis tiel longe kiel mi povis imagi. Kaj mia animo gajnis ŝancon por elverŝi miajn sekretojn. En tiu situacio, mi anstataŭis estanteco per estinteco, realecon per iluzio, kaj enŝovis min en la svagan inertecon.

Sed mi povis aŭdi la orel-ŝiran voĉon de

buĉado en la mondo; mi povis vidi klare malfortulojn lamente plori kaj fortulojn tirani ĉe ĉiu angulo de la mondo. Senvoĉaj krimo kaj malvirto neniel povas eskapi el lumado de mia koro, dum la venonta sed ankoraŭ ne venanta idealo jam konturiĝas klare en mia menso. La idealo anoncas, ke mi volas forigi la helik-ŝelon kaj fariĝi manto, kiu provis bari ĉaron per siaj kruroj. Biliono da bilionoj da kruroj de tiaj mantoj povus kunfandiĝi en nerompeblan feran brakon de giganto. Tion mi anticipas, kaj atendas, ke mi fariĝu ĝia parto.



Malantaŭ mia dorso, iuj asertis, ke mi jam perdis entuziasmon, kiel malvarma kaj introverta intelektulo. Se entuziasmo similas piroteknikaĵon, kiu ekstingiĝas tuj post ekbruligo, aŭ lignokarban fajron, kiu cindriĝas tuj post ekbruligo, vere mi ne apartenas plu al tiuspeca “patoso”.

Mi preferus, ke la fajro fandanta ŝtalon kovriĝus per povlo, kiel ondoj senĉese bolantaj ĉe marfundo, kiuj fiksiĝus per glata spegulo konektanta ĉielon kaj teron. Tio daŭrus tiel longe kiel la vivo, kaj restus tiel profunde kiel koro kaj animo. Se homa racio ne estas profunda, estas malfacile ĝin kruele trakti. Racio devas esti karma, larva kaj ŝvita, cerba, kaj homa racio. Tamen, se malvarma kaj kruela, ĝi estas la serpenta lerteco.

Tiuj, kiuj, malmulte spertintaj, ne akceptas la ĉion-suferintan honestan koron per siaj malfermaj brakoj, neniel komprenas, ke introverteco originale ne estas denaska nukso-ŝelo, en kiu kaŝiĝas senkompata monstro. Mi konas tiuspecan homon kun introverta temperamento. Lia universo estas vasta kaj profunda, kaj des pli li ne konstruas ĉirkaŭmuron por sin apartigi de la ekstera mondo. Kontraŭe, en lia interno ekzistas batalkampoj, ĉar ankoraŭ ne atinginte la superhomecon, li, kun profunda, malforta kaj sentimentala simpatio, volas ke lia koro batu kune kun la koroj de la mondo, kiuj petas subtenon kaj helpon, kaj aŭskultigas akuzojn kaj ĉagrenojn...

Iutage mi okaze ekmemoris tio, kion rimarkis Hawthorne en sia verko *Scarlet Letter* (Skarlata Letero), kaj mi skribaĉis kelk-linian dialogon sur paperpeco:

“Ĉe la sojlo de morto, mi volas diri: bone, prijuĝu min!”

“Sed per kiaj normoj, tiuj laŭvolaj, interkontraŭdiraj aŭ eĉ memkontraŭdiraj?”

“Do lasu Dion prijuĝi!”

“Se ne ekzistas Dio?” vi demandis.

“Jam sufiĉe mi prijuĝis min mem!”

Mi jam sufiĉe prijuĝis min mem! Pro tio, mi akiris pardonon kaj komprenon – mi akiris komprenon.

En purgatorio, animo elkreskigis flugilojn kaj leviĝis alten. Por kio?

“Tiujn, kiuj penas senlace kaj senĉese, ni povas savi.” (el *Faŭsto*)

“Estas vi, kiu igas vin mem leviĝi,” Goethe diris aliloke.

“Ne hezitu tiamaniere!

Mi iru al la paradizo,

ĉar tiel mi indas, kiel homo,

je la nomo de l’ hero.

Malfermu viajn akrajn okulojn,

vidu la koron ĉi tie klare,

vidu la vivan vundon lasitan de malvirto,

vidu la traŭmaton de neforigebla ĝojo.”

Tio estas peco da “ordinara tragedia kaj kortuŝa dramo de la homa vivo”, kiu havas nenian rilaton kun la tragedia kaj kortuŝa dramo de herooj vulgare nomataj. Unu el du estas montpinto kuŝanta sur kapoj de miliona popolo, kaj la alia la bazroko sub piramido. Ĉu la ordinaruloj, mi pensas, devas esti en la koro de Petöfi, kaj esti invitita por aŭskulti al la elegio de lia simfonio?

“Sendube!” Mi aŭdas la voĉon de la epoko. La voĉo disrompas lian enkoran solecon, ĝuste tiun solecon, kiu faras lin suferi la tragedian sorton. Pli suferiga tiu sorto estas ol lia ripetada luktado kontraŭ serpento, leopardo kaj tigro. Tamen kiam li krias, “Mi jam falis teren, sed mi ne volas repenti,” tiuj homoj ĉirkaŭ li, eble la homoj de li amataj, malĝoje diras secrete, “Ah, tiu homo, kiel neperfekta li estas! Li estas destinita tiel ordinara kiel mankoplena.”

Tio estas tragedia kaj kortuŝa dramo sub la plumo de Romain Rolland.

nokte je la dek-tria de aŭgusto, 1943

elĉinigi **Hongjia**

EL «LAŬZI»



ĈAPITRO 37

(Politike Laŭzi kontraŭstaras al pozitivaj agoj. Tenante sin je la principo de “farado de nenio kaj nenio restanta nefarita”, li deziras, ke oni havu nenian ambicion, nek entreprenemon, kaj tiam la tuta socio nature konservos sian stabilecon kaj pacon.)

La Taŭo ĉiam estas en “senagado”,
Kaj tamen ekzistas por ĝi nenio, kio restus
nefarita..
Se la reĝoj kaj la princoj alkonformigus sin al ĝi,
Ĉiuj estaĵoj spontanee submetus sin al ili.
Sed se, malgraŭ sia submetiĝo, ili ekhavas
dezirojn.
Mi bridus ilin per la sennoma simpleco¹.
Bridate per la sennoma simpleco,
Ili estus liberaj de ĉiaj deziroj.
Liberaj de ĉiaj deziroj, ili kvietiĝus,
Kaj tiam la mondo nature trovus sian stabilan
ordon.

¹ La simpleco egalas la Taŭon (Vd. noton 3 de ĉap. 28). Ĉar la Taŭo estas sennoma (Vd. la unuan linion de ĉap. 32), tial ankaŭ la simpleco estas sennoma.

ĈAPITRO 38

(Tiu ĉi ĉapitro plu klarigas la principon de “farado de nenio kaj nenio restanta nefarita”.
Laŭ Laŭzi ĉia ago, se ĝi estas konforma al la

principo de “senagado”, estas konforma al la Taŭo kaj sekve al la Virto. Kontraŭe, se oni intence agadas por montri ĉie, ke li estas kun la Virto, tia konduto ne konformas al la Taŭo kaj sekve li malsukcesas konservi la Virton.

Laŭzi opinias ankaŭ, ke la socia nestabileco rezultas el la difekto al la Taŭo. Li esprimas per laŭdoj ankaŭ sian sopiron al la simpleco kaj senornameco.)

La supera virto ne montras sin en formala virto,
Kaj tiel ĝi posedas la virtecon;
La malsupera virto rigide alrokiĝas al formala virto,
Kaj tiel ĝi perdas la virtecon.
La supera virto ne agas por sin montri kaj ne bezonas intence tiel agi;
La malsupera virto agas por sin montri kaj bezonas intence tiel agi.
La supera humaneco agas por sin montri kaj senintence tiel agas;
La supera justeco agas por sin montri kaj intence tiel agas.
La supera deco¹ agas por sin montri,
Kaj kiam ĝi trovas nenian respondon, ĝi nudigas siajn brakojn kaj faras trudon.
Tial, post kiam la Taŭo estas perdita, leviĝas la Virto;
Post kiam la Virto estas perdita, leviĝas la humaneco;
Post kiam la humaneco estas perdita, leviĝas la justeco;
Post kiam la justeco estas perdita, leviĝas la deco;
Tio, kio estas nomata deco,
Estas efektive la manko de lojaleco kaj sincereco kaj la komenco de malordo.
Tio, kio estas nomata antaŭvido,
Estas efektive la ornamo² de la Taŭo kaj la origino de malklereco.
Jen kial la granda homo sin apogas prefere sur tio, kio estas solida,
Ol sur tio, kio estas malsolida.
Li sin apogas prefere sur tio, kio estas simpla,
Ol sur tio, kio estas ornama.
Jen kial li forĵetas la lastan kaj akceptas la unuan.

¹ Ĉi tie la esprimo “supera deco” legiĝas *li* en la ĉina

